

TEA-BULTENO

17^A JARO

NOVEMBRO - DECEMBRO 2014

NUMEROJ 11-12

Silente kaj piedpinte nia kara Amiko Viglo (Giuseppe Valente) decidis transiri al alia mondo.

Li finis sian teran vivon lundon la 27^{an} de oktobro, post ĉirkaŭ tri-monata restado en malsanulejo.

Gislaste lia vigla menso vigle aktivadis, lia cerbo senhalte ellaboradis novajn planojn por la estonteco. De tempo al tempo li priskribis al ni novajn metodojn por pli fruktodona agado, ĉu en esperanta ĉu en la loka socia kampoj, rezultojn de pripensadoj dum la deviga enlita kuŝado, kiam minutoj, horoj kaj tagoj ŝajnas pli longedaŭraj. Kun akre kritikema okulo li rigardadis sian portempe limigitan ĉirkaŭon, por poste sugesti la plej efikajn metodojn por ŝanĝi, eĉ renversi, sistemon laŭ li tute nebone funkciantan.

Klerulo, filozofo, recenzisto, poeziemulo, vulkano de ideoj, sincera amanto de Esperanto al kiu li dediĉis parton de sia vivo: ĉio ĉi kaj eĉ pli li estis. Antaŭ la enhospitaliĝo li estis kompilanta vortaron pri sinonimoj kaj antonimoj: li estis atinginta la literon D... la restantajn li finos en sia nova restadejo.

Laboru en Paco, Viglo!

Elda

Estas malfacile skribi jam nun pri nia Viglo...

Ankoraŭ mi havas antaŭokule lian figuron kuŝantan en hospitalo, kie neniam li perdis sian kritikemon pri la ĉirkaŭaĵo, intereson pri filozofiaj temoj, emon al plua esperanta agado. Mi pensas pri la dialogoj dum tiuj tri monatoj, kiam mi klopodis instigi lin moviĝi, reagi forte por pliboniĝo de la sanstato, kaj eluzi lian plenan volon por reveni al pli-malpli normala vivmaniero. Sed... estis pli facile por mi paroli, ol por li fari tion kion mi "pretendis". Verdire, li ofte respondis "ĉu indas?" kaj per tiu ĉi demando oni komprenis la pezon por li de tiu tuta situacio, kiu estis komplika kaj ŝajne kun nemultaj elirvojoj. Lian estontecon li povis bone taksi kaj ĝi ne aspektis aparte favora. Supozeble mi estis la lasta persono kiu havis la eblecon paroli kun li, malgraŭ iom da problemoj, kaj interŝanĝi pensojn kaj sentojn. Mi ĝojas pri tiu lasta vizito, dimanĉe, ĉar neniam mi povus iel pardoni al mi mem malĉeeston en tiu lia lasta ankoraŭ tute konscia kaj klar-mensa vespero. Kiom klarvida, mense riĉa li estis, vi povas mem konstati, la Forsaluto ĉi sube montras lian ironion, pensmanieron kaj sintenon pri la deviga adiaŭo, kiun ni ĉiuj devas fronti. Kaj tiu ĉi Forsaluto estu por ni modela ekzemplo... kaj plia instruo, la lasta. Edvige

FORSALUTO

DE CEREMONIA VOJAĜANTO

de Giorgio Caproni

Amikoj, miaopinie pli bone estas por mi komenci malsuprentiri la valizon.

Eĉ se mi ne scias precize la alvenhoron, kaj eĉ se ne konas mi, kiuj stacioj antaŭas la mian, certaj antaŭsignoj al mi diras, laŭ kio atingis mian oreton pri ĉi lokoj, ke mi baldaŭ devos vin forlasi.

Bonvolu min pardoni pro tiu ioma ĝeno al vi. Kun vi mi estis feliĉa ekde la ekiro, kaj al vi tre danko mi estas, kreu min, pro la bonega kunestado.

Ankoraŭ mi longe ŝatus kun vi babili. Sed estu. La transigan lokon mi ne konas. Tamen eksentas mi ke ofte vin memori mi devos, en la nova rezidejo, dume okulo mia jam vidas de la fenestreto, trans la fumo humida de l' nebuligo nin ĉirkaŭanta, la ruĝan diskon de mia stacio.

Mi petas forpermeson de vi

ne povante al vi kaŝi, etan, konsternon.

Estis tiel bele paroli kune, vidalvide sidantaj; tiel bele konfuzi la vizaĝojn (fumi, interŝanĝante cigaredojn), kaj tiu multa rakontado pri ni (tiu facila elpenaĵo, adresata al aliaj), ĝis fine konfesi tion kion, alpremitaj almure, neniam ni aŭdacus iumomente (erare) konfidi.

(Pardonu min. Temas pri peza valizo, eĉ se ĝi entenas nenion apartan: tiom pli ke mi demandas min kial mi ĝin kunprenis, kaj kiun helpon ĝi povos doni al mi poste, kiam mi ĝin havos kun mi. Tamen mi devas ĝin porti eĉ se nur por sekvi la kutimojn. Mi petas, bonvolu permesi al mi pre-
teriri.)

Jen. Nun ke ĝi estas en la koridoro, mi sentas min pli trankvila. Bonvolu min pardoni).

Mi diris, ke estis bele kunestadi. Babiladi. Ni havis iajn disputojn, tio normalas.

Ni eĉ unu la alian (ankaŭ tio normalas) malamamis

en pli ol unu okazo, kaj ni bridigiĝis nur pro ĝentileco.

Sed, kiom gravas. Estu kiel estu, mi ree diras al vi, kaj tutkore, dankon pro la bonega kunestado.

Forsaluton al vi, doktoro, kaj al via elokventa doktrino. forsaluton al ci, knabineto minca, kaj al cia bonodoro de amuzejo kaj herbejo sur la vizaĝo, kies koloro milda estas tiel delikate intensa.

Forsaluton, ho militisto (ho maristo! Surtere kiel ĉiele kaj mare) al paco kaj al milito. Kaj ankaŭ al Vi, sacerdoto, forsaluton, kiu min demandis ĉu mi (li ŝercis!) ricevis kiel doton la kredon je la vera Dio.

Forsaluton al scio kaj forsaluton al amo. Forsaluton ankaŭ al religio. Mi ja estas ĉe la alvenpunkto.

Nun ke pli forte mi aŭdas grinci la bremsojn, mi forlasas vin vere, amikoj. Adiaŭ. Pri ĉi tio, mi certas: mi atingis malesperon serenon, sen konsterniĝo. Mi eltrajniĝas. Bonan pluvojaĝon.

(tradukis E. Doerfler)

Laste trovitaj!

LA UNUA MONUMENTO DE ESPERANTO

Okaze de la 4^a Tutaŭstria Esperanto-kongreso, kiu estis aranĝita Pentekoste (la 31-an de majo 1914) en la kuracurbo Franzensbad (Bohemujo), oni inaŭguris la unuan monumenton honore al d-ro Zamenhof. La iniciatinto estis Jakob Hechtl, prezidanto de la loka grupo kaj organizanto de la kongreso.



Unue d-ro Zamenhof — samkiel ankaŭ multaj aliaj esperantistoj — ne konsentis pri la starigo de la monumento; sed la propaganda fervoro de s-ro Hechtl

favore al la efektivigo de tiu ideo estis tiom entuziasma kaj persista, ke li sukcesis venki la kontraŭstarojn kaj realigi sian planon, tuj metante je dispono ankaŭ iun monsumon. Sed ne nur li estis malavara: el la tuta mondo s-ro Hechtl ricevis helpajn "mon-brikojn" por la konstruo de la monumento.

La monumento vere imponis: ĝi estis ses metrojn alta konstruaĵo farita el bavara konkohava kalkŝtono. Ĝi baziĝis sur masiva, kvinflanka piedestalo, kaj la supra parto, konsistinta el kvarpilastra ŝtona bloko, montris la terglobon, tenatan de kvin alegoriaj virinfiguroj, simbolantaj la kvin kontinentojn. Ili tenis en siaj manoj girdandon el foliaro. Meze de la monumenta bloko, estis lokitaj la kvinpinta stelo el verdigita bronzo kaj, sub ĝi, la bronza reliefo de la busto de nia Majstro, sub kiu legeblas la vortoj "D-ro Zamenhof, aŭtoro de Esperanto". Sur la soklo de la monumento la vortoj: "Per Esperanto al Kompreniĝo, al Paco, al Laboro kaj al Dio!" Sur la posta flanko de la solida kolono estas la nomoj de tiuj, kiuj distingiĝis per aparte altaj mondonacoj aŭ per alia subtenmaniero. Inter ili troviĝas en la unua vico la iniciatinto de la monumento, s-ro Hechtl, kaj la urbo Franzensbad, kiu senpage donis la lokon por la konstruaĵo, sed ankaŭ kontribuis per sufiĉe granda monsumo, prenante ankaŭ sur sin ĝian prizorgadon kaj konservadon. Ene de tri monatoj la monumento, projektita de la skulptisto Karl Wilfert, estis preta.

La inaŭguro estis tre solena: s-ro Hechtl faris la festparoladon, kaj kiam la kovraĵo falis, la orkestro ludis la Esperantan himnon. Poste parolis urbestro Loimann kaj reprezentantoj de Esperantaj grupoj kaj unuiĝoj, kiuj metis florkronojn je la piedoj de la monumento.

Fine la ĥoro "Liederkrantz" kantis festhimnon, kaj la "Falkensteiner Quartett" prezentis Esperantan kanton. Post la solena parto la kongresanoj estis invitaj festeni en la "Kurhaus". Vespere la tuta "Kurpark" kaj monumento estis bele iluminitaj, kio tiom pli konvinkis la esperantistojn pri la taŭgeco kaj konveneco de la loko akceptinta la unuan Esperanto-monumenton.

Ekzistas kelkaj poŝtkartoj pri la evento, inter kiuj tiu en la dekstra kolumno kaj la ĉi flanko, sur kiu vid-



blas grupo da kongresanoj starantaj antaŭ la monumento. Interesaĵo por triestanoj: maldekstre sidas tri viroj, el kiuj la unua dekstre estas la prezidanto de Rondo Esperanta Trieste, d-ro Arturo Ghez. Dum la inaŭguro, li entuziasme alparolis la kunvenintojn - lia parolado estis libret-forme eldonita de Presejo Esperantista "La Tipografica" de A. Paolet: ekzemplero troveblas en la TEA-Biblioteko.

Bedaŭrinde post 24 jaroj, aŭtune 1938, la germanazia reĝimo aneksis la ĉeĥan teritorion nomatan Sudeta Lando kaj la naziistaj trupoj samjare komplete detruis la monumenton.

En 1989 la Ĉeĥa Esperanto-Asocio disvastigis la informon pri intenco restarigi ĝin kaj tiucele komencis monkollektion. La plano estis ĝin inaŭguri en 1992 dum la UK, kiu estus devinta tiam okazi en Prago. Sed fiaskis la tuta projekto, eĉ ne okazis tiam la kongreso en Ĉeĥio.

Intertempe la Asocio de Esperantistaj Handikapuloj farigis kaj inaŭguris tabulon dum sia jarkunveno en Františkovy Lázně [ĉeĥe, Francisko-banejo] la 19^{an} de oktobro 1991, kiu estis metita samloke de la iama monumento. Surskribitaj tamen estis pluraj eraroj, kiujn oni planis korekti mallongtempe, surmetante alian seneraran. Sed vandala ago de loka ebria lernanto tute detruis ĝin, junio 1994. Reaktivigis la Asocio de Handikapuloj, persistanta en sia projekto, kaj malgraŭ pluraj financaj problemoj je la 8^a de aprilo 1995 estis solene inaŭgurita, antaŭ 50 personoj, nova memorŝildo kun teksto laŭ propono de Hugo Röllinger. La tabulo konsistas el sveda granito kaj mezuras 50 oble 70 centimetrojn.

Jen la teksto:

La 31-an de majo 1914 estis ĉi tie inaŭgurita kaj en 1938 detruita la unua monumento honore al

D-ro L. L. Zamenhof

aŭtoro de Esperanto la Internacia Lingvo.

La memortabulo inaŭgurita dum la kongreso de Esperantistoj-Handikapuloj 19.X.1991, detruita 10.VI.1994, renovigita kun helpo de Britaj Esperantistoj, de Ĉeĥa Esperanto-Asocio kaj de Raymond Boré aprile 1995.

Fonto: Vikipedio; Monumente pri Esperanto de H. Röllinger



Projekto "Koni Trieston"

Trafoliumante libron pri historiaj rememoroj

La kunfrataro de l' bastonbato



Ĉi maldekstre estas la bildo de la ĉefaltaro dediĉita al Senmakula Koncipiĝo, en la preĝejo Sankta Maria Maggiore (=la plej Granda). Sur la sankta tablo elegantas la la tabernaklo je kolonetoj, ĉe kies flankoj staras la statuoj de kvar jezuitaj sanktuloj kaj du preĝantaj anĝeloj. Piede de tiu ĉi altaro

okazis, en la 17^a jarcento, sanga interbatiĝo.

En 1632 grupo de noblaj triestanoj kaj Jezuitoj fondis la "Kunfrataron de la Senmakula Koncipiĝo". Ĝi estis aprobita de *Vitteschi*, jezuita generalo, per buleo je la 2^a de majo. La membroj kunvenadis nokte: tiam ili konfesdiris, komuniigis, preĝis kaj kantadis je kandela brilo. En 1634 estis proponite, ke estu enkondukitaj en la ritaron iaj humiligaj ekzercoj, konsistantaj el interskurĝado. La unua ekzerco komenciĝis la unuan martan vendredon en 1636. La dua sekvis en alia vendredo, poste ankoraŭ, kaj ankoraŭ ... ĝis kiam okazis, ke unu el la "skurĝantoj" tro fervore, pli ol necese, batadis. La paca kunveno degeneris kaj ĉio finiĝis per ĝenerala interboksado, el kio rezultis pluraj vunditoj. La postan tagon, la Ĝenerala Prefekto, monsinjoro barono *de Marenzi*, dekretis la nuligon de la tro 'fajrema' kunfrataro.

Historio pri la ŝiplernejo Beethoven

Komence de la pasinta jarcento, oni eksentis la neceson, doni al la triestaj studentoj, ricevintaj la abituriantan diplomon ĉe la Mara Instituto, pli profundan koneblon kun la maro aldonante, fine de la studperiodo, praktikan trejnadon pri navigado. Tial, en la unuaj monatoj de 1913, la plej gravaj mar-kompanioj kunfon-



dis societon - la Anoniman Societon 'Ŝip-Lernejo Trieste' - kiu havis la taskon eltrovi taŭgan ŝipon kaj ĝin aĉeti por realigi tiun planon. Estis elektita en Nederlando iu varŝipo - 3.250-tonela - kiu kostis tricent mil kronojn, plus kromajn kvindek-ses mil por struktura adaptado. Je la komando de la ŝiplernejo, nomita *Beethoven*, oni komisiis kapitanon *Vittorio Orschlek* (bohem-devenan, diplomigintan en Triesto) kaj ĉefoficiron *Giovanni Cosulich*. La kvar-masta velŝipo el ŝtalo estis translokigita al *Cadice* por renovigado, de kie ĝi eknavigis, la 27^{an} de oktobro 1913, direkte al Aŭstralio tra Montevideo: surŝipe estis ankaŭ 25 triestaj kadetoj. Post 82 tagoj da navigado, ĝi alvenis en la aŭstralia haveno *New Castle*. Tie oni malŝarĝis grandan kvanton da karbo por gaso enŝipigitan en *Valparaiso*. Post tio oni komencis la revenvojaĝon, laŭplane daŭrontan kvardek tagojn.

Sed tiu vojaĝo ne atingis sian lastan celon. Oni atendadis kaj atendadis, ĝis fine oni deklaris la ŝipon definitive malaperinta (je la 25^a de septembro 1914 post 180 tagoj de ĝia foriro el *New Castle*). La obstina espero de parencoj kaj amikaro revidi vivaj siajn karulojn, dronis en senfine dolora maro. Multegis la sindemandoj pri la kialoj de tiu katastrofa evento, en kiu pereis tiom da homoj, sed la vero neniam estis trovita.

Tamen fojfoje la destino, eĉ se kruela, malkaŝas neatenditajn surprizojn. Iu *Alfredo Marcovich*, dalmata kapitano el *Zadar*, dum halto en iu hispana haveno je la eksplodo de la Unua Mondmilito, eksciis hazarde pri saviĝo de kelkaj ŝippereuloj el *Beethoven*, mirakle albordiĝintaj al la malgranda polinezia insulo *Pitcairn*. Sed tiun informon ne sekvis konkretaĵoj, krom du kuriozaj, neklarigeblaj sed suspektindaj koincidoj.

La unua rilatas iun televidan dokumentfilmon el la jaro 1991^a, faritan en polinezia vilaĝeto, kie iuj parolis lingvon tre similan al ... triesta dialekto. La dua baziĝas sur novaĵo aperinta sur loka presaĵo laŭ kiu du knabinoj el Friulo Julivenetio estis heredintaj ... iun insuleton en Polinezio. Oni tuj pensis pri ŝercaĵo, sed la polineziaj leĝistoj, al kiuj oni alturniĝis prie, konfirmis pri tiu heredaĵo, rakontante pri alveno en la insulon, komence de la jarcento, de du ŝippereuloj, kiuj dum sia restado en tiu loko riĉiĝis tiom, ke ili povis aĉeti eĉ la tutan insulon!

Tie ĥaj tie pluĥetante...


"La digoj, konstruitaj de kastoroj, ree funkciigas la akvajn fluojn": En akvoplana valo, kia estas tiu *Washington*-a, kie fiŝoj, kultivejoj kaj loĝantaro ofte interkonkurencas pro akvo, la biologoj alturniĝis al la plej bravaj natur-inĝenieroj de nia planedo, por ke tiuj helpu reestabli la akvajn vojojn kaj vivmedion de salmoj. La terproprietuloj kutime aŭ enkaŝigas aŭ mortigas la kastorojn kiuj baras la irigaciajn kanalojn en la *Yakima*-Valo. Estis starigita projekto por translokigi tiujn bestetojn, akuzatajn pri ĝenerala damaĝado, al la fontoj de rivero *Yakima*, kie oni povus maksimume utiligi ilian talenton pri maĉado de salikoj kaj konstruado de rifuĝejoj.

"Kastoroj povas ankaŭ esti tre valoraj ekologiaj inĝenieroj". Tion asertas *Mel Babik*, ĉefprojektisto de ne-profitocela organizaĵo kiu klopodas revenigi la salmojn en tiun teritorion.

En diversaj ŝtatoj (*Oregon*, *Utah* kaj aliaj) oni uzadis tiun sistemon malmultekostan sed tre efikan: la kastoraj digoj, lagetoj kaj aliaj strukturoj aldonas malsimplecon al bone funkcia ekosistemo, malrapidigante la akvan fluadon kaj valan sedimentadon. La salmoj kaj aliaj fiŝoj profitas de la rezervujoj de iom stagnanta akvo por ripozi, manĝi kaj sin kaŝi. Intertempe la kastoraj lagetoj helpas la "stokadon" de akvo sur la subternivelo. "La kanalo kun la stokigita akvo eliĝas dum la jarperiodo, kiam fiŝoj bezonas malvarman akvon kaj la terkultivistoj necesas ĝin grandkvante", klarigis *William Meyer*, kiu kunordigas la planon pri akvaj resursoj en la *Baseno Yakima*.

Finfine rekonita la valoro de laboro de kastoro!!!





Nun vi legos la du lastajn rakontojn el la slovena libro "Butalci" de Fran Miličinski, tradukitajn de Janez Zadavec. Mi esperas, ke vi ĝuis la legadon kaj ankaŭ amuziĝis, kio tre bonvenas en ĉi momentoj de akre tikla krizo, kaŭzanta mankon de ridetado. Malgraŭ plurfoja invito, sendi iun kontribu

aĵon samteman, nenio ĝis nun atingis la redakcion de la TEA-Bulteno. Estas tamen ankoraŭ tempo por tion fari, do, kuraĝu, ĉar bezono je ridado grandas!

BLOVADO DE GRENA KAĈO

Butalanoj ne nur malantaŭ varma forno ripozis, sed multaj tra la mondo kroĉis, kaj utilajn novaĵojn alportis.

En fora tempo, kiam Butalanoj ankoraŭ ne konis grenon, revenis post longa vojo vilaĝa bravulo kaj en dorsosako li alportis grenon kaj kaĉon. Al mirantaj vilaĝanoj li diris: "Ĉu vi scias, kio estas greno? Ĝin ni semos kaj poste el ĝi kaĉon faros - ne ekzistas pli bona manĝaĵo ol grasita kaĉo! Konvinkiĝu vi mem!"

Ordonis li hejme, ke oni tuj kuiru la kaĉon. Meze de la vilaĝa placo sur grandan tablon li metis kaĉon en grandan pelvon. La kaĉo estis bone grasita kaj brilis en la suno. Apud la pelvo kuŝis ligna kulero, kaj invititaj estis ĉiuj vilaĝanoj por provi unu kuleron de tiu nekonata bongustaĵo.

Venis tiel sinsekve kaj interpuŝiĝe la Butalanoj, kaj ĉiu rapide metis unu kuleron en la buŝon kaj tuj transdonis la kuleron al sekva atendanta mano. Iris tiel la kulero rapide sian vojon de mano al buŝo, de buŝo al sekva mano. Eĉ la tempo por preĝi ne sufiĉus, kaj jam la pelvo malplena kaj Butalanoj kun brulvunditaj buŝoj!

Ĉar la kaĉo estis tre varma kaj neniu havis tempon blovi ĝin pro urĝo kapti la kuleron. Butalanoj bone memoris tion! Kaj kiam post la grensemado ĝi bele kreskis, ili kolektiĝis ĉirkaŭ la grenkampo kaj fervore blovis sur la grenon.

Malfeliĉe la Butalanoj havas malicajn najbarojn en la najbara vilaĝo Tepanje. Kaj la preteriranta Jaka el Tepanje scivoleme haltis, sed Butalanoj decide forpelis lin dirante: "Vi certe ne blovos sur tiun grenon ĉar ĝi estas nur por nia kaĉo!"

BUTALA POLICISTO KAJ CEFIZELJ

En Butale la komunumo havis serviston, kiu dum labortagoj bovinojn kaj sian mallaboremmon paŝtis, sed semajnfine sur kapon metis ĉapelon kun ruĝa rubando kudrita, en la manon lancon prenis kaj tiel fariĝis policisto, kiun ĉiuj rabistoj timegis.



Grava Informo!!!

La arkivo de Scienca Revuo 1949-2013 legeblas rete!

"SCIENCA REVUO" estas eldonata de ISAE, Internacia Scienca Asocio Esperantista. La revuo aperas ekde 1949 kaj estas daŭriganto de Internacia Scienca Revuo fondita en 1904.

ISAE nun malfermis publikan interretan arkivon de Scienca Revuo de la postmilita periodo, kio signifas, ke en la retejo <http://scienca-revuo.info> estas

Pri tiu policisto aŭdis ankaŭ la terura rabisto Cefizelj, kiu onidire jam sep homojn strangolis kaj tri virinojn. Scivolema, Cefizelj volis vidi tiun faman policiston kaj dimanĉe, kiam en Butale ĉiujara kermeso okazis, li aperis antaŭ la nazo de la policisto.

Tuj la policisto diris: "Hop Cefizelj, jam mi havas vin! Rekte en la karceron! Ni havas tajloron nomatan ekzekutisto, kiu tuj mezuros vian kolon."

Cefizelj senvorte iris kun la policisto kaj tiel ili preteriris la panbakejon. "Ho - diris mildvoĉe Cefizelj, - ĝis kiam mi manĝi povas, nur pecon da freŝa pano mi deziras, ĉar tiel bonan nur en Butale oni bakas." "Nu, - kapjesis la policisto - grasan sterkon ni havas kaj tial ankaŭ greno estas bonega." Kaj la policisto permesis al Cefizelj la bakejon eniri, dumtempe li kun lanco severe antaŭ la pordo gardis. Atendis kaj atendis, sed Cefizelj ne eliris - ĉar la aĉulo foriris tra malantaŭa pordo eĉ sen adiaŭo. Policisto tiel koleris, ke li laŭte kraĉis. Sed Cefizelj malaperis kaj ankaŭ tia kolero ne helpis.

Pasis semajno, pasis du, venis tria dimanĉo kaj Cefizelj denove estis scivolema, kaj denove aperis antaŭ la nazo de la policisto.

"Hop, - diris la policisto, - jam mi havas vin, kaj vi ne plu fuĝos!" Cefizelj pardonpetis: "Fremdulo mi estas kaj lastfoje mi perdiĝis, mi tre bedaŭras." Kaj li sekvis la policiston kiel ŝafido sian patrinon.

Preteriris ili denove la bakejon, kaj Cefizelj malsata denove petis permeson por eniri la bakejon. La policisto tion permesis, sed tuj konkludis: ruzulo vi estas, sed pli ruza mi - kaj atendis Cefizelj-n ĉe malantaŭa pordo. Atendis kaj atendis, sed Cefizelj ne venis, ĉar li foriris tra la antaŭa pordo. La policisto ege koleris kaj preskau laŭte li blasfemis.

Pasis tri semajnoj kaj jen Cefizelj denove antaŭ la nazo de policisto. "Hop, - diris la policisto - jam mi havas vin! Nun vi vidis kion signifas policisto de Butale." Kaj tuj Cefizelj pardonpetis, dirante: "Pasi-ntfoje vi ne estis antaŭ la pordo kaj ege mi serĉis vin kaj apenaŭ hodiaŭ mi trovis vin." Kaj tre obeeme li sekvis la policiston.

Preterirante la bakejon, denove Cefizelj milde petis por eniri kaj panon aĉeti. Tiam policisto tuj reagis: "Vi, birdeto, denove volas forkuri tra la pordo kie mi gardos, ĉu? Tuj donu al mi monon, mi alportos panon kaj vi ĉi tie atendu!"

Eniris policisto la bakejon, aĉetis panon, eliris kaj tuj rimarkis ke Cefizelj malaperis. Li tiel koleris, ke eĉ la langon li montris malantaŭ Cefizelj. Feliĉe Cefizelj tion ne vidis, nome li estas terura rabisto kiu jam sep homojn strangolis kaj tri virinojn.

☞ ☞ ☞ ☞

legeblaj en skanita formato pli ol 2000 artikoloj, aperintaj inter 1949-2014 en Scienca Revuo. La artikoloj estas skanitaj en simpla, senteksta bilda formato, sed la retejo donas eblon pri serĉado laŭ nomo de la aŭtoro kaj titolo de la artikoloj.

Motoroj de la projekto estis Johannes Mueller (DE) kaj Mélanie Maradan (CH).

La skanado de la artikoloj realiĝis danke al la kunlaboro kun Interkultura Centro Herzberg.

Adreso de la arkivo:

<https://scienca-revuo.info/issue/archive>

Fonto: Ret-Info / Lingvo-Studio, LS

PLIOFTAJ PARONIMOJ

*Do, preskaŭ je la fino de la paronima listo ni estas.
Ĉu vi estis kontenta pri tiu ĉi informaro?... aŭ ne???*

Talanto	(Fi) antikva pezmesuro, monunuo	Tetanoso	(Md) infekta malsano
Talento	(Fz) rimarkinda kapablo mensa	Tetro	(Zo) sp. de tetraono (<i>Lyrurus tetrix</i>)
Tamariko	(Bo) g. (<i>Tamarix</i>) de trunkarbustoj el tamarikacoj	Tetr/	(In) pref. signifanta "kvaro"
Tamarisko	(Bo) sp. de tamariko (<i>Tamarix mannifera</i>) kun manĝebla rezino, kiu eble estas la biblia manao	Tetrao	(Zo) (<i>evi</i>) = bonazio
Tanilo	(Te) tananta substanco	Tetraono	(Zo) g. (<i>Tetrao</i>) el galiniformaj birdoj
Tanino	(Bo) vegetala substanco, abunda enŝele de kverko ks arboj, ĉefa aganto de tanilo	Tino	(Te) ligna kuvo en formo de duonbarelo
Tangi	① (Mr) ruliĝo de ŝipo laŭlonge ② (Be) danci tangon, Sud-Amerikan kanton el kiu evoluis la danco	Tineo	(Zo) g. (<i>Tinea</i>) de malgrandaj noktopapilioj
Tanĝi	① apenaŭ tuŝeti ② (Mt) tuŝi kurbon en ununura punkto	Tinio	(Md) grupnomo de parazitaj dermatozoj sur kaphara haŭto
Tanko	(Ar) kirasita aŭtomobilo	Tinuso	(Zo) g. (<i>Thunnus</i>) de grandaj maraj fiŝoj el ordo de perkoformaj
Tankao	(Be) mallonga japana poemo; = utao	Tireo	(Md) = Tireoido en kunmetaĵoj
Tarantelo	(Be) vigla itala danco	Tireoido	(Md) kartilago de la laringo; ĉe viroj konsistigas la gorĝan pomon
Tarantulo	(Zo) sp. de venena araneulo (<i>Lycosa tarantula</i>)	Tiroy	(Md) = Tiroido en kunmetaĵoj
Tarso	(Md) ostaro de piedradiko aŭ instepo*	Tiroido	(Md) sendukta glando antaŭ la laringo
Tarzo	(Md) fibreca lameno de la palpebra rando	Tono	(Be) sono kun difinita alto
Tarsio	(Zo) G. (<i>Tarsius</i>) de mamuloj el la sub-ordo de prasimioj	Tonelo	(Mr) unuo de ŝipkapacito
Tegmento	supra parto de konstruaĵo, ĝin kovranta kaj ŝirmanta	Tonemo	(Be) unuo de tonalteco
Tegumento	tio kio tegas, kovras, ŝirmas la korpon de besto (haŭto, skvamoj, karapaco)	Tonio	① (Md) stato de malforta muskola kontrahiĝo ② (Ke) koncentriteco de solvaĵo
Tempo	① (Fz) parto de daŭro ② (Fk) norma sistemo por sinsekvaj fenomenoj	Tonuso	(Md) = Tonio
Tempio	(Md) flanka kapoparto	Tuno	(Te) mezurunuo de pezo
Templo	(Ar) konstruaĵo destinita al kulto	Toro	(Ar) Dika modluro kun duoncirkla profilo ĉe kolonbazo
Tendeno	① (Md) fibreca muskol-ekstremaĵo aliganta la muskolon al ostoj ② (Ar) ŝnuro de pafarko	Torio	(Ke) radioaktiva elemento -Th-, metalo blanka, neabunda
Tendo	(Te) akvoimuna tolaĵo aranĝita por ŝirmi	Torijo	(Ar) pordego antaŭ jaŝiro (ŝintoa templo)
Tento	instigo al malbona ago	Turo	(Ar) konstruaĵo tre alta rilate al du aliaj dimensioj
Tenebro	(Fk) profunda mallumo	Torni	(Te) rondforme tajli solidan materialon per maŝino
Tenebrio	(Zo) g. (<i>Tenebrio</i>) de insektoj el koleopteroj	Turni	(Te) rotacie movi objekton
Terceto	① (Be) triversa strofo ② (Be) komponaĵo por tri partoj, ludantoj, voĉoj (pp muziko)	Traco	= Trako ③
Tercio	① (Be) intervalo inter tri tonoj ② (Sp) tria pozicio en skermado ③ (Sp) sinsekvo de tri ludkartoj ④ (Fz) diservo, kanonika horo	Traceo	(Te) vojlinio projektita sur mapo
Tercino	(Be) metrika skemo en poemo, iniciatita de <i>Dante Alighieri</i>	Trako	① (Te) vojprojekcio ② (Te) reloj ③ (Fz) ano de gento loĝinta en Trakio
Terciario	(Ge) geologia epoko	Trakio	(Ge) E-Eŭropa regiono, nun dividita inter Bulgario, Grekio kaj Turkio
Teroro	(Fz) sisteme uzata terurado	Trakeo	(Md) spirtubo ĉe vertebruloj kaj surteraj artropodoj (Bo) vaskulo malhavanta ĉelojn transverse septitaj
Teruro	tre forta timo	Tranĉo	① ago de iu, kiu tranĉas; = tranĉaĵo ② (Md) tre akra koliko
Tetano	(Md) daŭra muskola kontrahiĝo	Tranĉeo	(Ar) longa fosaĵo sur batalkampo
Tetanio	(Md) sindromo je kontrakturaj atakoj	Transiro	(Te) moviĝo ĝis alia flanko
		Transito	(Te) traveturo de varoj tra lando al kiu ili ne estas destinitaj, sen pago de limimpoto
		Tremo	(Md) mallonga serio de muskolaj konvulsiaj movetoj, pro paroltimo, frostoj...
		Tremao	(In) vokala supersigno ("")
		Tremolo	(Bo) sp. de poplo (<i>Populus tremula</i>)

Novembra Programo

4-a, mardo	17h00 - Unua- kaj dua-gradaj kursoj 19h00 - Memorajoj pri Viglo
7-a, vendr.	20h00 - El Esperanta gazetaro
11-a, mardo	17h00 - Unua - kaj dua-gradaj kursoj
12-a, merkr.	13h00 - Saluton al Giuseppe Valente (Viglo) ĉe la Triesta tombejo
14-a, vendr.	20h00 - Trafoliumante PIV-on!
18-a, mardo	17h00 - Unua- kaj dua-gradaj kursoj
19-a, merkr.	14h50 - Esperanto en alirprogramoj RAI UNO
21-a, vendr.	20h00 - Vortoj kaj muzikoj el pasinteco
25-a, mardo	17h00 - Unua- kaj dua-gradaj kursoj
26-a, merkr.	17h30 - Inaŭguro de la ekspozicio pri pentraĵoj
28-a, vendr.	20h00 - Kunestado en nia sidejo

Decembra Programo

2-a, mardo	17h00 - Unua- kaj dua-gradaj kursoj
5-a, vendr.	17h30 - Konkurso pri pentrado - Premio "Angelo Soranzo" - Disdonado de la premioj (unua etaĝo)
9-a, mardo	Sidejo fermita
12-a, vendr.	20h00 - Trafoliumante PIV-on!
16-a, mardo	17h00 - Unua- kaj dua-gradaj kursoj
19-a, vendr.	20h00 - Memorante nian Majstron!
23-a, mardo	19h30 - Kristnaska Festo
29-a, lundo	14h50 - Esperanto en alirprogramoj RAI UNO
30-a, mardo	20h00 - Adiaŭ, 2014 ^a jaro!

Bonan Kristnaskon kaj Pacan 2015^{an} Jaron al la TEA-anoj kaj Gelegantoj deziras Triesta Esperanto-Asocio!



BULTENO de TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO Redaktanto: Eida DOERFLER - testudo.ts@gmail.com
 Sidejo: Via del Coroneo 15 - Trieste - mardo 18-20; vendrede 19-21
 Tel: (+39) 345 2490291 - 040 350093; 339 2226936
 Reto: esperantotrieste@yahoo.it; nored@tiscali.it
 Grupaj tt-etoj: www.tea1906.altervista.org; www.karstajtagoj.altervista.org
 Poŝta adreso: Via del Coroneo 15 - IT-34133 Trieste - Italio Poŝtĉekkonto N° 10834349

KONKURSO PRI PENTRADO POR DULINGVAJ VERKOJ PREMIO "ANGELO SORANZO" JARO 2014

La ekspozicio de la konkursantaj pentraĵoj okazos ekde merkredo la 26^a de novembro ĝis la 5^a de decembro 2014, en la ejoj lokitaj unuaetaĝe de la TEA-sideja domo, en via Coroneo 15, kun horaro: **17.30-19.30**, ĉiutage sed ne dimanĉe.

INAŬGURA TAGO

merkredo la 26^a de novembro je la 17a kaj 30.

PREMIA CEREMONIO

de la gajnintaj konkursantoj:
Vendredon la 5^{an} de decembro je la 17h30

La ĵurio konsistas el jenaj personoj:

Prof-ro Antonio Sofianopulo
Orient-Greka komunumo
 Renata Damiani
pentristino kaj skulptistino
 Ottavio Gruber
artista

Triesta Esperanto-Asocio atendas vin multnombraj okaze de ĉi evento

Disvastigu ĉi tiun informon inter viaj amikoj, konatoj, parencoj ...

BIBLIOTEKA APOGO BACHRICH UNUAFOJE SUBVENCIIIS

La Fondaĵo "Biblioteka Apogo Honore al la Geedzoj Maria kaj Johano Bachrich" disdonis 1500 eŭrojn kiel siajn unuajn subvenciojn. Ĉiuj sep petintoj ricevis subvencion, kiun la Libroservo de UEA sendis kiel librojn aŭ aliajn eldonaĵojn laŭ la dezirlistoj de la petintoj: Triesta E-Asocio ricevis 130 € en libroj.

SOLVO de cerbotiklilo de Viglo

La petita cifero estas **7**.

Fakte, en ĉiuj figurgrupoj al la laternombro de la unua figuro adiciĝas la laternombro de la aliaj figuroj, kiam lokigitaj dekstre kaj alte rilate la antaŭajn, dum forpreniĝas la laternombro de tiuj lokigitaj dekstre kaj sube.

Por la unuaj figurgrupoj:

$$4 + 4 + 4 = 12$$

$$6 + 3 - 4 = 5$$

$$6 - 3 - 3 = 0$$

Do, por la lasta figurgrupo:

$$6 - 3 + 4 = 7$$

Simple, cu ne?

